

**Luciano Bianciardi**

# KIEL ONI IĜAS INTELEKTULO

Manlibro por uzo de la hodiaŭaj gejunuloj, precipe de tiuj, kiujn panjo Naturo ne dotis per talento

*El la itala tradukis Carlo Minnaja*

## Luciano Bianciardi

### KIEL ONI IĜAS INTELEKTULO

La parolo estas direktita al la gejunuloj, sed olduloj ne ĝin ignoru: ankaŭ intelektulo karierinta, se li volas eviti stumblofalegon, devas koni la armilojn kiujn havas en la manoj tiu, kiu pretiĝas por la socia grimpo. Ĉiuokaze, kaj la unuj kaj la aliaj memoru, ke inteligento utilas malmultege al la kariero.

Ŝajnas ja klare ke en tiu ĉi mondo ĉion oni povas lerni: bredadon de l' kokinoj kaj arton de l' regado, sciencon pri financoj kaj kanastoludon, astronomion kaj interpretadon de l' sonĝoj, kun celo psikanaliza, sed ankaŭ por gajni ĉe la ŝtata loterio. Fakte ekzistas gramatikoj kaj manlibroj, kiuj eksplikas tute detale kiel oni faru. Inter la multaj, eĉ ne unu dediĉita al la junuloj kiuj celas vivi, eĉ ja prosperi, en tiu kampo de la homa aktivado, cetere ne esenca por la homa vivo, kiu konatas sub la ĉionentena kaj svaga nomo "kulturo". Nepris do verkado de tiatipa manlibro: normoj klaraj, precizaj, efikaj, por la uzo de la gejunuloj kiuj decidas iĝi intelektuloj. Normoj ne profitcelaj, kiuj baziĝas sur sperto abunda kaj negativa. La aŭtoro ja faris dum sia junaĝo multajn dikajn erarojn, kaj, sekve, kapablas atentigi junulojn de la novaj generacioj.

Al ili do estas dediĉitaj ĉi tiuj paĝoj. Specife al tiuj, inter la hodiaŭaj gejunuloj, kiujn panjo Naturo ne dotis per talento. Ja evidentas, ke estontaj geniuloj ne bezonus legi kaj studi niajn konsilojn: probable ili kapablos eltiriĝi mem. Nia leganto estas junulo proksimume dudekjara, absolute mezvalora, eĉ mediokra, sen apartaj taŭgecoj nek por sporto, nek por mekaniko, nek por belarto. Knabo, kiu, lasite sola, sen niaj konsiloj, povus tute bone iĝi bankoficisto, biletkontrolisto ĉe la fervojoj, termezuristo ĉe la katastro. Ni volas ĝuste savi la mediokrajn junulojn el mediokra ekzisto, kaj ilin direkti al la grimpo de Helikono<sup>1</sup>.

Sed, atentu: la aliaj, la cerbeguloj, la geniuloj kaj duongeniuloj tre malbone agas, se ili neglektus ĉi verkon: ili certe ne trovos ion, kio povas utili al ilia kariero, kaj tamen, se ili volus informiĝi pri la metodoj de la aliaj, ili povus poste sin gardi kontraŭ ili kaj prepari, kiel diras la sportaj ĵurnalistoj, la "taŭgajn kontraŭmovojn". La aŭtoro sin sentus maljuste partizana se li volus favori iujn je malavantaĝo de aliaj. Sammaniere, eĉ se nia parolo estas direktita al la gejunuloj, olduloj tre bone agas, se ili ne ŝtopus siajn orelojn: ankaŭ la intelektulo karierinta, ĉe la pinto de sia kariero, se li volas resti ĉepinte kaj eviti rapidan subenfalon, devas koni la armilojn, kiujn havas en la manoj tiu, kiu sin pretigas al la grimpo. La lukto inter generacioj ne ekskludas frapojn, super- kaj subtaliajn; ni nin lokas ekster la batalon, ni instruas la ludantojn nespertajn kaj malpli preparitajn, sed ni volas samtempe, ke la malnovaj herooj de la kultura boksejo ne malkonu nian instruadon. Poste, gajnu la plej bona, kaj for la sekundantojn.

Kion signifas, por komenci, la vorto "intelektulo"? Aŭtoro kiu en ĉi postmilita periodo trafis apartan kaj merititan sukceson inter la legantoj ideologie maldekstraj diris, ke intelektulo devas esti konsiderata ĉiu, kiu ne praktikas manan metion. Difino malavara, abunda kaj tial ne sufiĉe strikta, tro larĝa: de la pastro ĝis la leterportisto, supren ĝis Benedetto Croce<sup>2</sup>, ĉiuj kunfalus en la korbegon de la intelektularo. Ni rezignu tuj pri ĉi tiu difino kaj ni turniĝu al la vortaro. Da ili ekzistas multe kaj malkare, kaj, pretere, ni povas ilin konsulti senpage.

Estas intelektulo, diras unu vortaro, kiu vivas en la mondo de studado kaj inteligento. Li vivas, en ordo, sed kion li faras, en tiu mondo? Homo, diras alia, kun alta kulturo kaj juĝkapablo. Aŭ: klera persono, kun la animo malferma al la ĝuoj de la spirito. Difino, kiel oni vidas, tre malpreciza kaj ankaŭ erara, ĉar ĝi mordas sian voston: "klerulo" estas dirmaniero tre proksimuma, atribuebla ankaŭ al tiu, kiu finis la elementan lernejon; animo kaj spirito estas pli malpli la sama afero, tial ni devus konkludi, ke la animo de la intelektulo malfermas sin al la ĝuo pri si mem, kaj

<sup>1</sup> Monto en Greklando, de kie fontas du riveroj, kiuj laŭ la helena mitologio estis sankte dediĉitaj al la Muzoj.

<sup>2</sup> Fama itala filozofa (1866-1952).

do al ia formo de soleca malvirto, malkonsilita de la malnovtempaj kuracistoj, kaj rekomendata de neniuj ajnatempe. Kaj do?

Pli bone lasi ĉion neklara, eĉ ne provi difinon precizan. Al ni interesas, ke nia mezvalora junulo alvenu kiel eble plej alten kiel intelektulo. Se poste tiu koncepto restas nedifinita, des pli bone. Nebulo povas esti malutila, sed ne ĉiam; kelkfoje, kiam ĝi malestas, oni ĝin inventas, kiel en la ŝipbataloj, por kaŝi al la malamiko niajn movojn. Samon faros ni: finfine, tiun fumon ne ni kreis, ĝi estis ĉiam. Malantaŭ la fumo devus esti kiel ĉiam la rostaĵo. Ni klopodos ĝin fortiri de la fajro en la ĝusta momento.

La leĝoj de la itala ŝtato malpermesas al neniuj iĝi iun tagon prezidento de la Respubliko. Ĉiu ajn, naskiĝinte en nia lando, se oni ne lin enfermas en karceron antaŭ la kvindek jaroj, havas la eblon transloki sian rezidejon iam estonte, en la palacon de Kvirinalo.<sup>3</sup> Eblo, ni koncedu, sufiĉe neprobabla: estas pli probable, ke li iĝu virino, ĉar, laŭ la statistikoj, ĉiujare du italoj ŝanĝas sekson, dum da civitanoj kiuj ascendas la Kvirinalon estas unu je ĉiu oka jaro. Sammaniere, neniuj leĝoj malpermesas al italaj civitanoj iĝi iam intelektuloj, kaj ne ekzistas limigoj laŭ socia klaso, aŭ politika aŭ religia kredo. Sed ankaŭ ĉi-kaze egaleco estas amplekse teoria; konkrete ekzistas iuj kiuj startas kun avantaĝo, aliaj kun malavantaĝo kaj ekzistas ankaŭ tiuj kiuj restas ĉe la startofosto.

En la dua postmilita periodo, ekzemple, estis konsiderinda avantaĝo la origino manlaborista aŭ kamparana: filo de dumtempa kampara dungito, filo de ministro estis meritoj. “Li konis la malsaton”, oni diris kun preskaŭ konsterna admiro. “Li havas kalojn ĉe la manoj”, “Lia patro estis trakŝanĝisto ĉe la telfero de Scarlino”.<sup>4</sup> Je tiu tempo la filo de elementlerneja instruistino, kreskinta inter libroj kaj kajeroj, regule diplomita en publika lernejo, se li decidis eniri la mondon de kulturo, li eniris per biciklo surhavante surtuton de mekanikisto. Li akceptis reciti memkritikon, metante inter siajn malvirtojn “la etburĝan originon”, li sin metis je la servo de la laborista klaso, kaj de tempo al tempo li elbuŝigis gramatikan eraron. Hodiaŭ ne plu, la fluo inversiĝis, hodiaŭ universitata katedro plaĉas ankaŭ al la avangardistoj, al la koleruloj, al la renversantoj de la strukturo (en la angla “establishment”, vorto sufiĉe maloportuna, indikanta la mastrojn de la strukturo, en nia kampo).

La gefiloj de riĉaj gepatroj havas kompreneble ĉiujn avantaĝojn proponatajn de mono, sed estas probable, ke ili deziras ĝin elspezi por si, anstataŭ ĝin uzi cele al la kariero, ĉar ĉiuj karieroj havas kiel celon la monon, kaj estas malprobable, ke la investo estos profitdona. Monhava junulo preskaŭ neniam estos interna partoprenanto, sed eble spektanto kaj mecenato: li povos, ekzemple, fondi literaturan premion titolitan laŭ sia nomo, kaj financatan de aliaj personoj, ne malofte tiuj samaj, kiuj gajnos la premion. Tio povas esti formo de reklamo ege profita: preskaŭ kiel korbopilka teamo.<sup>5</sup>

Juna aristokrato havas kelkajn eblojn, kondiĉe ke li kapablas uzi bone sian nobelan titolon, kiu kutime ne kuniĝas kun konsistaj monrimedoj. De defalintaj nobeloj plenas la itala duoninsulo, elmontri kronon kaj pilkojn sur la vizitkarto, aŭ ĉe la dompordo, eble utilos por tuŝi la koron de la legantoj de fotorevuoj kun dinastiaj nostalgioj (ĉiam pli maloftaj, de iom da tempo), sed certe ne por karieri en la mondo de kulturo. Ĉi tie, male, nepros ia mieno de toleremo al la propraj estimataj praavoj, kiuj eble partoprenis en la krucmilitoj. Li subskribos per la nura antaŭnomo kaj nomo, lasante la nobelan titolon en la telefonlibro, kaj vokigante sin “sinjoro grafo” de la servistino, se li ankoraŭ havas unu.

Laŭŝajne grandan avantaĝon havas la junulo kiu naskiĝas en hejmo de iu partoprenanto en la laboroj, filo de intelektulo jam konata. Ĉi tiu sin nutras per kulturo jam de la lulilo, trinkas la patran lakton densan je humanismaj grasoj, kune kun tiu pulvora, kiun trudas al li la nutristino (kutime la patrino ne mamnutras). Preter la metaforoj, li lernas jam de la lulilo paroli kiel intelektulo, sin movi, gesti, rideti, aludi, subkomprenigi kiel intelektulo. Li ekkutimas jam de la vindaĵo vidi en sia domo

<sup>3</sup> Sidejo de la Prezidento de la itala Respubliko.

<sup>4</sup> Vilaĝo apud Grosseto, regiono Toskanio, centra Italio.

<sup>5</sup> En Italujo ofte korbopilkaĵa teamoj havas la nomon de sponsoro, male al futbalteamoj, kiuj kutime havas la nomon de sia urbo.

verkistojn, artistojn, kanzonistojn, nu, entute, “subskribulojn” de la kultura scenejo de sia lando. Je dek ok jaroj li havis sian unuan seksan sperton kun iu “lernoŝipo” estimata en la plej bonaj literaturaj salonetoj, li ci-diras kun Pasolini,<sup>6</sup> kapablas diskuti en la ĝusta momento pri psika aliigo, pri Gestalt,<sup>7</sup> pri “pop art”,<sup>8</sup> nu, entute li estas mirjunulo, kiu naskiĝis ege bonŝanca.

Lia malfeliĉo estas ĝuste ĉi tiu: la aferoj progresis tro bone dum lia infanaĝo kaj adolesko, preskaŭ certe li pluiros laŭ la vojo plej facila, li vivos per la patraj rentumoj, je tridek jaroj li estos maljuna kaj laca. Probable intertempe liaj hejmaj geamikoj malkovros, ke li estas kreteno, kaj ili disvastigos la onidiron, kun la sovaĝa ĝojo, kiu ĉiam akompanas ĉi malkovrojn. Paradokse, la avantaĝo estus ĝuste ĉe la flanko de la filo kun modesta origino, kondiĉe ke li havu fortikan dorson, pretan por pezaj laboroj sed ankaŭ por riverencoj. Teorie jes, sed praktiko nin instruas, ke la manlaboristaj manieroj, inter la intelektuloj, daŭras mollonge. Ili ekaperas en periodoj de krizo aŭ deprimiĝo, kiam multaj timas, aŭ esperas abruptan kaj definitivan socian renversion. Naskiĝas tiam la mito de la manlaboristo sana, portanto de valoroj novaj, kontraŭ la meza socitavolo miopa kaj malbrava, kontraŭ la klaso de la mastroj avida kaj koruptita. Oni atendas la palingenezon, la alvenon de fortoj freŝaj. Poste, kiel ajn iru la aferoj – do kaj se la evento efektive okazas, kaj se, male, ĉio pluas kiel antaŭe, - oni malkovras, ke la manlaboristo estas muldita precize kiel ĉiu alia homo, kaj do li volas precize tion, kion volas la aliaj en tiu difinita historia momento: la fridujon, la aŭtomobilon, la blankan ĉemizon, la laŭhoran servistaron kaj la filmojn de James Bond. Li aspiras identiĝon kun la meza tavolo – kaj neniu povas konsideri tion kulpo – dum la meza tavolo volas supreniri super la mezon, sin distingi, ankaŭ en la kulturo.

Ĝuste tie, do, en la tavolo meza kaj ofte mezvalora estas pli probable, ke oni rekrutos la morgaŭajn intelektulojn. Kaj nian leganton ni imagos tie ene: li havas elementlernejan instruistaron kiel patrinon, bankokasiston kiel patron, kaj, kiam okazas la renkontiĝo inter ni kaj li, li vizitis sukcese la elementan lernejon, kontentige bone ankaŭ la malsuperan mezgradan, kaj li sukcesis diplomigi preskaŭ kun meza noto sep.<sup>9</sup> Liaj studoj estis penigaj, kaj grandparte senutilaj. Laŭ la programoj li devus koni ĉion: historion de la literaturo itala, latina, helena, angla, dudek kantojn de la Dia Komedio, parkere, la arton de ĉiuj epokoj kaj de ĉiuj landoj, trigonometron, botanikon, geografion, homan anatomion, la tutan historion, de la babilonanoj ĝis Vittorio Veneto<sup>10</sup> (kun apendico pri faŝismo, la milito kaj postmilita periodo kaj la eksto de la Respubliko, kiun tamen la profesoro, pro la enorma vasteco de la programo, ne havis la tempon ekspliki. Kaj temis pri la nura parto, kiu povis iel utili).

Li legis, eĉ se sinteze (la sintezon faris por li iu universitata profesoro, ĝin ekstraktante siavice de antaŭa sintezo, verko de mortinta profesoro, kutime majstro de la unua), li do legis la universalan penson, de Taleto ĝis B. Croce, pasante tra Platono, Aristotelo, Sankta Tomaso, kaj Locke, Kant kaj Hegel. Se nia junulo estis diligenta, li havos la impreson, ke li estas laŭregula koncerne la programojn, tio estas, ke li scias ĉion. Liaj gepatroj paradadas fiere kaj pli kaj pli konvinkiĝas, ke ili bone elspezis sian monon: iun tagon, ili opinias, ili estos rekompencitaj pro tiom da oferoj.

Se male nia junulo rezonas iomete, li rimarkas, ke li malŝparis valorajn jarojn. Li ne povis agi alimaniere, konsentite, li estis sub la mastrado de siaj gepatroj, li ŝuldis obeon, ne sciante pri la realaj fortoj kiuj regas la mondon kaj determinas nian itineron tra la vivo. Li estus povinta ĉesi siajn studojn en la dua elementlerneja klaso, jam lerninte la abocion. En la dua elementlerneja klaso normala knabo kapablas jam skribi kiel bitniko, kaj volonte daŭrigus laŭ tiu vojo, sed la instruistino, kun granda pacienco kaj granda peno, kapablis poste lin korekti, la profesoroj faris la ceteron kaj nun, dudekjara, nia ulo verkas precize kiel Giuseppe Lipparini.<sup>11</sup> Nun estos lia vico peni por

<sup>6</sup> Pier Paolo Pasolini (1922-1975), itala poeto, eseisto, kritikisto, filmreĝisoro.

<sup>7</sup> Psikologia teorio, rilatanta al percepto kaj sperto, origininta en la komenco de la dudeka jarcento.

<sup>8</sup> Grava arta fluo de la dua duono de la dudeka jarcento.

<sup>9</sup> Mezlernejaj notoj en Italujo estas de nulo (plej malbona) ĝis dek (plej bona).

<sup>10</sup> Nomo de la loko, kie okazis la lasta batalo inter Italujo kaj Aŭstrujo-Hungarujo, kiu metis finon al la unua mondmilito.

<sup>11</sup> Giuseppe Lipparini (1877-1951), itala verkisto kaj kritikisto, profesoro pri itala literaturo diversloke.

mallerni, reakiri la manierojn de la signifoplena anakoluto, de la kontraŭsintakso, transiri de Manzoni al Verga, de Verga al Gadda, de Gadda al Kerouac.<sup>12</sup>

Ni faris ĉi tiun longan paroladon nur ekzemplocele. Estu tute klare, ke ni havas neniun intencon sugesti, proponi, konsili al nia junulo la karieron de verkisto. Certe, ankaŭ la verkisto eniras iamaniere en la kategorion de la intelektuloj, sed li eniras kaŝe, kune kun la sciencisto, la inĝeniero, la teknikisto: profesioj bone difinitaj, kiuj malbone toleras adjektivojn. Profesioj kiuj postulas certan kvanton da talento. Male ni, ĉe la komenco, rimarkis ĝuste la grandan nebulecon de la koncepto pri intelektulo. Se en nia menso estas klarega la celo proponota al nia juna leganto (atingi la plej altan rungon eblan en la ŝtuparo de kulturo), neniel klare estas al ni kion praktike signifas kulturo, kaj estas tute obskura la konotacio de intelektulo. Kaj obskura ĝi nepre restu.

Ankaŭ ĉar, ni insistas, nia parolado estas direktita al junulo perfekte meza, dotita per neniuj specifaj talento. Li ne kapablas verki, kaj eĉ ne emas; li ne kapablas rakonti parabolon, kaj tute rifuzas eĉ deziri; li ne distingas elektronan komputilon disde telerlavilo, sed li ne maltrankviliĝas pro tio, ĉar dumvive li uzos nek unu nek la alian mastrumaparaton. Nia juna leganto volas nur alveni, ne adaptiĝante al pasigo de siaj jaroj malantaŭ oficeja giĉeto. Li elektis karieron tute malprecizan, kaj li agis bone. Nun li sekvu niajn konsilojn, kaj la sukceso estas garantiita.

## FINO DE LA UNUA PARTO

### DUA PARTO

Ĉi tiu kompendio de konsiloj kaj normoj, kiujn ĉiuj povas legi profite, celas precipe tiujn junulojn kiuj, kvankam malhavantaj talenton, volas tamen entrepreni sukcese la karieron de intelektulo. En la unua parto ni vidis, kiel la koncepto “intelektulo” estas malpreciza kaj malklara; ni evitis doni al ĝi precizan difinon; eĉ, ni rekomendis lasi la aferojn kiaj ili estas, eĉ ne klopodante maldensigi la kulturajn nebulojn. Ni krome konstatis, ke, kvankam la kariero de intelektulo estas malferma al ĉiuj, sen distingo de riĉo, ideologio, socia tavolo, ĝi plej bone adaptiĝas al junulo naskiĝinta en la tiel nomata “meza socitavolo”. Nia Juna Leganto, kiun ekde nun ni nomos simple, la “Nia” estas, nuntempe, preskaŭ dudekjara, kaj post la lica studado, finita sen aparta distingiĝo, eliras elsub la familia protekto kaj estas enskribiĝonta al la universitato.

Kompreneble la Nia estas provinculo. Kiel provinculon fakte oni devas kompreni, almenaŭ en Italujo, ĉiun ajn, kiu naskiĝis nek en Romo nek en Milano. Kaj ĉar Romo kaj Milano, kun la sumo de siaj loĝantoj, ne superas kvar milionojn, dum la italoj estas entute kvindek milionoj, el tio sekvas, ke el cent italoj kiuj naskiĝas, naŭdek du estas provinculoj. Fortaj pro ĉi tiu superpeza plimulto, provinculoj ne bedaŭras esti tiaj, sed ankaŭ ne tro fieras. La urbo en kiu naskiĝas kaj kreskas la Nia havas probable inter kvindek mil kaj ducent mil loĝantojn: ne tre probable, ke ĝi havas universitaton, kaj ĉi tiu estas konsiderinda avantaĝo por la Nia.

Li venis en la mondon kaj iĝis plenkreska sub ĉies okuloj. Nu, povas esti, ke la Nia sukcesis akiri la famon de ŝerculeto, de frenezuleto, al kiu ĉio estas permesata: pozicio tre avantaĝa, kondiĉe ke oni ne eliru el la urbaj muroj. La urbo eltenas kaj amas sian frenezuleton, sed ne pli ol unu ĉiufoje, samnombro kiel pri urbestro. Kun tiu ĉi diferenco, ke la urbestro ŝanĝiĝas je ĉiu kvara jaro, dum la oficiala frenezulo deĵoras dum tuta vivo.

Povas ankaŭ esti, ke la Nia sukcesis travivi infanaĝon kaj adoleskon tute platajn, sed ankaŭ tio ĉi estas malfacila. Li certe havis sian belajn elpaŝojn, siajn aventurojn, siajn misaventurojn. Nu, li estu certa, ke la personoj memoros pli bone la duajn ol la unuajn. Ni supozu, ke okazis al li, en la elementa lernejo, ke li pisis en sian pantalonon; neniuj forgesos plu tion. Eĉ se li havus tian

---

<sup>12</sup> Alessandro Manzoni (1785-1973), Giovanni Verga (1840-1922), Carlo Emilio Gadda (1893-1973) estas italaj verkistoj, kun stilo evoluanta de la absolute klasika de Manzoni al la regiona interparola de Verga ĝis la preskaŭ pastiča de Gadda. Jack Kerouac (1922-1969) estas kanaddevena usona verkisto, idolo de la gejunuloj de la Sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento..

inteligenton, ke li iĝos, post dudek jaroj, nova Enrico Fermi<sup>13</sup>, tie en la vilaĝo ĉiuj daŭre nomos lin “la Pisuleto”.

Pli bone do por li, ke la universitato estas eksterurbe, eĉ se je nur dudek kilometroj. En alia urbo, eĉ nur iom pli granda, ĉiam provinca do, kaj tio estas bona ĉar la provincaj universitatoj havas en Italujo famon de pli granda seriozeco kompare al tiuj grandurbaj. “Li studis en Romo” signifos nenion, morgaŭ. Eĉ male, tio levos la dubon, ke li tute ne studis, nur pagis la enskribiĝkotizon kaj rigardis rapide la studnotojn. “Li studis en Pavia” estas certe multe pli bone: tio sugestas kvar jarojn da gaja universitata vivo kaj samtempe da muta paleco en la templo de la pensema Diino.

La elekto de la fakultato postulas iom pli multe da atento. Iam oni dirs, kaj nespertulo tion plue ripetas, ke “doktoriĝo pri juro malfermas ĉiujn pordojn”; certe, ĉiujn pordojn de la ŝtataj oficoj, grupo A, plej alta kariero ĝis rango sesa,<sup>14</sup> kaj la pordojn de la tribunaloj, post jaroj da praktikado ĉe iu Advokatego malavara je konsiloj kaj avara je mono. Prefere oni eĉ ne pensu pri tio. Sed estus same grava eraro, flanke de la juna aspiranto-intelektulo elekti la fakojn kiuj unuavide ŝajnas pli proksimaj al liaj intereso, do enskribiĝi al la Beletra Fakultato. Absolute ne: tro natura kaj samtempe tro plena de ligoj. La juna doktoro pri “Beletro” emos poste konkursi por mezlerneja katedro, maksimume akiri privatdocentecon, kaj poste la universitatan katedron, utilan por akiri komisionojn kaj profitojn de la kultura industrio. Vojo longa kaj kurboriĉa. La Nia strebos rekte al la celo: al la lernejo li revenos, eventuale, kiel al sinekuro, al asekuro kontraŭ maljunaĝo, en okazo de malsukceso en la kultura kampo aŭtentika. Tio signifas: mondana.

Pli bone do elekti fakultaton tre malproksiman de la humanismaj studobjektoj: Medicino povas jam taŭgi, aŭ ankaŭ Kemio (Inĝenierarto male estas nekonsiderinda, ĉar ĝi postulas tro da sindediĉo, precipe en la unua jardujo). La Nia devus, se lia universitato ĝin havas, enskribiĝi al la fakultato pri Biologiaj Sciencoj, aŭ vizitadi kurson de studoj novaj, sufiĉe nedifinitaj sed konsiderataj seriozaj kaj originalaj. Enskribiĝi kompreneble ne signifas frekventi la lekcionojn: sufiĉas sin vidigi kelkfoje en la prelegejo, ne kaŝi sian seniluziiĝon kaj sian enuon, povi ĉiam montri sian universitatan rekonkarton kun la jarostampoj kaj kun la surskribo: “Fakultato pri Biologiaj Sciencoj”.<sup>15</sup> La Nia, male, sin vidigos, sufiĉe ofte, ĉe la lekcionoj de la fakultato pri Beletro.

Ne ĉe ĉiuj, kompreneble, ĉar tio estus peniga kaj ĝena. Male, li elektos nur unu kurson, donante sian preferon al profesoro, kiu estu juna, ne etata (komisiita estas bonege) kaj kiu havas famon de ekstravaganculo: en la etimologia signifo, la profesoro, ni supozu, pri itala literaturo, kiu ŝatu digresii pri kinarto. La Nia lin vizitados intense, sidante ĉe la unua benko, montrante signojn de varma interesiĝo. Ne estas malfacile, sufiĉas jesi per la kapo, kiam la rigardo de la juna profesoro haltas ĉe li. Li sin rimarkigos, li ŝajnos lernanto inteligenta, la profesoro fine ridetos al li, kaj je ĉi tiu punkto estos bone lin pridemandi en la koridoro, post la lekcionoj, pro iu ajn kaŭzo: peti de li, ekzemple, iun bibliografian informon. Naŭ fojojn el dek la juna profesoro volos scii pli multe pri ĉi tiu disĉiplo tiom talenta, kaj ĉiu povos imagi lian miron ĉe la ekscio, ke li eĉ ne estas enskribita en la fakultato kaj ke do li sekvas pro vera intereso.

Oni parolos, inter la docentaro, estos neeviteble, ke oni disdiros pri tio. Sed je la dua jaro estos jam tempo forlasi la biologiajn sciencojn: “kia seniluziiĝo” diros la Nia al demandanto pri la kaŭzo. Sed atentu: se povis esti eraro enskribiĝi tuj al la fakultato pri Beletro, eraro eĉ pli granda estus enskribiĝi nun. Estas la momento de sociaj sciencoj, aŭ, manke de ili, de politikaj sciencoj. Bone aŭ malbone, kvar jaroj estas la minimuma studperiodo necesa por magistriĝo, kaj kvar jarojn la Nia devos pasigi ĉe la universitato, ankaŭ por akiri la prokraston de la soldatservo.<sup>16</sup> Lia gepatroj devas pagi dum tiom da tempo, kaj do penvaloras, ke la Nia profitu. Povas esti, ke en la familio oni ne estas tro kontenta vidi lin papiliumi de una fakultato al alia; kaj ke oni lin riproĉas pro tio.

<sup>13</sup> Enrico Fermi (1901-1954), itala fizikisto, kunpartopreninto en la preparo de la unua nuklea fisio kiu kondukis al la atombombo.

<sup>14</sup> Iama hierarkio de la ŝtata administra strukturo en Italujo.

<sup>15</sup> Plejofte, tamen, en la italaj universitatoj, studado pri biologio ne estas en aŭtonoma fakultato, sed estas studprogramo ene de la fakultato pri Matematikaj, Fizikaj kaj Naturaj Sciencoj.

<sup>16</sup> Tiutempe en Italujo la soldatservo estis deviga je la aĝo de dek ok jaroj, sed, sub difinitaj kondiĉoj, oni rajtis ĝin prokrasti ĝis fino de la universitata studado.

Necesas en ĉi tiu okazo pacienci kaj toleri eĉ iujn kolerelverŝojn: iun tagon paĉjo kaj panjo ja rimarkos, ke ili tute ne forĵetis monon kun nenia profito, kaj sen akiro, ĉefe, fare de sia kara filo, de la kontento pri la fifama “paperpeco”.<sup>17</sup>

Devus esti klare do, ke la Nia neniam iĝos magistro pri io ajn: nek pri Biologio (estis eraro), nek pri Politikaj Sciencoj (la kariero de diplomato, hodiaŭ, havas nenion malsaman de tiu de notario) kaj kompreneble eĉ ne pri Beletro. Ĉar, se oni esceptas tiun junan profesoron, kiam li parolis pri kino, kompreneble, ĉar pri itala literaturo, inter ni dirite, tiuj kursoj pri Pontano,<sup>18</sup> nu, ili estis tiom tedaj! Tamen la Nia ne malŝparis siajn kvar lernojarojn, eĉ male.

Dum la gekolegoj diligentaj kaj superstudemaj superpenegis en la nombrado de la komoj de *De Monarchia*,<sup>19</sup> en la elkernigo de la filozofia penso de Pasquale Galluppi,<sup>20</sup> plej favorkaze en la spurado de la influoj-de-Joyce-en-la-rakontaro-de-Italo-Svevo,<sup>21</sup> afero kiu, maksimume, ekspluateblas per la publikigo de la magistra tezo en volumo, ducent kopioj eldonnombro, aŭtorrajtoj nulaj, la Nia intertempe lernis la nuran aferon kiu vere gravas, t. e. kiel oni karieras. Eĉ ja, lia kariero jam komenciĝis sur la lernejoj benkoj. Laŭŝajne li postrestis kvar jarojn, en la realo li troviĝas kvar jarojn antaŭ la aliaj. Kaj la aliaj – jen la belo – ne rimarkas.

Estis ja la aliaj tiuj kiu forĵetis valoran tempon. Dum la lernejoj monatoj kaj dum la libertempo, stulte okupitaj per pretigado de ekzamenoj kaj sinbanado en la akvoj de Adriatiko aŭ de Tireno. La profita utiligo de la libertempo, en nia kazo, sed ankaŭ ĝenerale, estas gravega. Anstataŭ iri al Riccione<sup>22</sup> serĉe al svedinoj, la Nia prave iris serĉi la svedinojn en la loko, kie ili troviĝas pli multnobraj, t. e. en Svedujo. Tio kostas pli malmulte, enkalkulante ĉion, ol fiksi kompletan pensionon triarangan en Bellaria,<sup>23</sup> dumil kvincent tage, ne inkluzivante la vinon. Petveturo estas neniel hontiga, posteno kiel telerlavisto en Stokholmo humiligas neniun plu, kaj tiom malpli junulon. Oni povas bonege vivi per pano kaj fromaĝo kaj dormi en la ĉambreto postbutika.

Eĉ pli, la Nia revenos hejmen kun kelkaj kronoj enpoŝe. Kaj kompreneble, kun kelkaj opinioj bone bazitaj, rekte akiritaj, pri la skandinava duoninsulo, ĝiaj loĝantoj, la politika strukturo kiun ili donas al si, iliaj kutimoj kaj moroj.

Opinioj, kiujn, petite, li povos ankaŭ prezenti al la geamikoj. Tamen estu tuj klare, estus grandega stultaĵo liaflanke aserti, ke svedinoj ĝuas plenan seksan liberecon, ke arkitekturo kaj urboplanado ne havas egalajn en la mondo, ke sanitara asistado estas perfekta, kaj plua listigo de similaj ŝablonaĵoj. La Nia diros, male, per la necesa singardo (li komprenigos, pli ol eksplicita diro), la jenon: en Svedujo estas loĝeja krizo, domoj estas malgrandaj, malkomfortaj kaj multekostaj, knabinoj ĝenerale malaltaj, iom diketaj, kun la lipharetoj kaj kun la postaĵo malalta, kelkaj eliras nur kun la avino kaj – ŝajne – surportas la ĉastecozonon.<sup>24</sup> Aventuroj neniam, tamen ne! Estis tiu amhistorio kun instruistino el Catanzaro, kiu troviĝis tie pro studvojaĝo. Iun vesperon li estis haltigita de la polico, oni devigis lin blovi en saketon el plasto, kiu alprenis verdan koloron, kaj tio por svedoj pravas, ke vi manĝis viandon vendrede, delikto sufiĉe grava, kiu kostis al li tri noktojn en gardoĉelo. Kun nura pano kaj akvo, kun la devo labori. La venontan someron, li decidis, li pasigos en Turkujo.

Ĉion tion, krom diri, la Nia ankaŭ povos surpaperigi, sed je du kondiĉoj. La unua koncernas la formon: la rakonta tekniko estos tiu “understatement” (lernu ĝin tuj, ĝi utilos ankaŭ estonte, ĉiam).<sup>25</sup>

<sup>17</sup> Aludo al la diplomo atestanta la akiritan studtitolon.

<sup>18</sup> Giovanni Pontano (1429-1503), itala beletristo kaj kritikisto, gramatikisto tre rigora.

<sup>19</sup> Latinlingva politika kaj sociologia traktaĵo de Dante Alighieri.

<sup>20</sup> Pasquale Galluppi (1770-1846), beletristo.

<sup>21</sup> James Joyce (1882-1941), irlanda romanisto, startinto de la modernisma fluo. Italo Svevo estas pseŭdonimo de Ettore Schmitz (1861-1928), itala prozisto; liaj romanoj estas forte influataj de la psikoanalizaj teorioj.

<sup>22</sup> Fama marloko ĉe la Adriatika bordo.

<sup>23</sup> Alia marloko, malpli luksa ol Riccione.

<sup>24</sup> Metala kaj leda zono malebliganta al virinoj seksajn rilatojn. Kvankam oni rilatigas ĝian originon al la krucmilita tempo, kiam nobeloj forrestis de siaj edzinoj dum longaj periodoj kaj do volis havi certecon pri ilia fideleco, la unuaj dokumentoj atestantaj pri tiu uzado en Italujo estas de la dekkvina jarcento.

<sup>25</sup> La signifo de tiu vorto, kiam enprenita en la italan pri verkostilo, estas “malreliefigo”, “malevidentigo”, “minimumigo”.

Kiu komencus parolante pri neatenditaj seniliziigoj, aŭ pri la neceso revizii viajn ideojn pri Svedujo, aspektus pedanto kaj ĝenanto. Komenco ĉiam konsilata estas la jena:

“Ege simpatia tiu Gunnar. Alta, masiva, iom kurba, kun la haroj grizaj kaj nekombitaj, li eniris ĉiuvespere trinkejon Skalt kaj tuj okulumis al mi, levante la dikfingron kiel signo de interkompreniĝo. Mi dum iom da tempo plu gargaris la kalikojn, kaj poste, tuj kiam la mastro reiris malantaŭen por kalkuli la kronojn, mi rapide prenis la botelon kaj verŝis la likvoron. Rapida rigardo tien kaj tien, kaj la maljuna Gunnar ĝin eltrinkis unuglute. La brunulino ĉe la vidalvida benko, ĉarma kaj eta, ŝajnigis, ke ŝi ne vidis. Ŝi apogis la kunplektitajn brakojn sur la tablegon plena de paneroj kaj odoran je rostita porkaĵo, kaj lasis ripozi la tre videblan sinon en la nigra trikoto – jam patrinecan, malgraŭ ŝiaj dek ses jaroj – sur la artikolo de la brako. Unu oscedo, kaj alvenis la horo fermi la butikon. La kvina matene, kun la suno ankoraŭ alta, ĉar somero, en Svedujo, ŝajne finiĝas neniam”.

Ĉi tiu estas modelo de stilo absolute ne engaĝa, pri kiu nepras konscii en ĉia situacio, kiam oni skribas kaj kiam oni parolas. Kaj jen kelke da ekzemploj de frazoj-plastroj, nepraj por diri kaj samtempe ne diri: “Eĉ kun siaj limoj”, “eĉ se ni ne konsentas plene”, “ni flankelasu pormomente la...”, “ni allasu, tamen ne koncedu”, “oni povus preskaŭ diri”, “iakvante”, “ne estas maleble”, “iom tro”, “iom malmulte”. Ĉar, finfine, la “understatement” koincidas kun la plejabsoluta evidento. Kiel en la ekzemplo plej fama: “Tuj kiam franco transiras la limojn de sia lando li estas tuj eksterlande”.

La dua kondiĉo rilatas, ni diru, al profesieco: verki, bone, sed kie? Ni povas certe ekskludi, ke la Nia vidu siajn notojn publikigitaj en “Corriere della Sera”,<sup>26</sup> tagĵurnalo en kiun oni eniras pli malfacile, kaj per metodoj, kiujn eble ni ilustras poste. Sama argumentado validas por la grandaj ĵurnaloj kun tutlanda distribuo, ankaŭ se aliro al ĉi tiuj varias. Estas pli probable, pli facile kaj entute pli utile aperi en provinca ĵurnalo, tiu, ekzemple, de la urbo kie la Nia studas. Sed kondiĉe ke li estu specife invitata de la direktoro, kaj ke lia kontribuo (nur unu, Dio gardu!) aperu en la tria paĝo.<sup>27</sup> Invitigi sin de la direktoro estas relative simple: sufiĉas komprenigi al li, ke neniu rekompenco estas postulata, ke sufiĉas, al junulo, la honoro vidi sian subskribon en tiuj samaj kolumnoj, kiujn ĉiumatene li aĉetas en ĵurnalbudo (ne estas vere, la ĵurnalon li legas en la kafejo) kaj kiujn li sekvas ege atente (falsa ankaŭ ĉi tio: li flugrigardas, se entute, la artikolojn de la direktoro, kaj ĵetas rigardon al la titoloj plej dikaj). Kiel li alvenis en la studejon de la direktoro? Rapide dirite: probable lin kondukis tien la juna profesoro komisiita pri itala literaturo kun diversflankaj intereso, kaj aparte pri kinarto. Ĉi tiu, kiu interalie zorgas pri recenzado de la filmoj enprogramigitaj en la sep urbaj kinejoj, konvinkigis, ke li malkovris, en tiu juna studento pri Biologiaj Sciencoj, senduban promeson por la patruja belarto.

Ĉu oportunas ricevi neniun rekompencan? Certe: la ĵurnalo pagas, kutime, malbonege, pli ol kvinmil lirojn ĝi ne donus, kaj do pli bone nenio ol malmulto. Ĉi tio valoras en ĉiu okazo: kiu donacas estas sinjoro, kiu akceptas malbonan pagon estas mizerulo. La Nia postulos tamen, ke la redakcia sekretariejo – kutime konsistanta el unu persono preskaŭ ĉiam insekse – donu al li la karteton sur kiu estas skribite: Sinjoro Tiu kaj Tiu kunlaboras al nia ĵurnalo. Oni petas aŭtoritatulojn kaj privatulojn lin helpi en la plenumado de lia laboro. Stampo, subskribo de la direktoro, subskribo de la koncernato, lia foto. Tio signifas absolute nenion, neniu havas devon plenumi tiun peton, tamen estas bone havi enpoŝe la karteton, precipe eksterlande. Tie neniu scias ke “La heroldo de Pavia” havas eldonnombron de sep mil, ok mil kopioj, por ili ĝi estas nur itala ĵurnalo, kaj la junulo kun la karteto iĝas aŭtomate eksterlanda ĵurnalisto, kiun oni gardu amika.

Atentu, tamen. ne venu al la Nia la stulta ideo insisti, voli iĝi ĵurnalisto. Ĵurnalismo estas metio, peniga kaj malfacila, kiu postulas kvalitojn, kiujn la Nia ne havas kaj neniam havos. Se li decidis (li degnis) publikigi unu sian verkon, li klarigos, ke tio por li estas escepto, ke liaj ambicioj estas aliaj, ke li ne deziras sin elmontri. La regulo validas ĉiam, kaj ĝi estas konfirmita de la antikva

<sup>26</sup> “Vespera Kuriero”, la ĵurnalo plej lagata en Italujo.

<sup>27</sup> En la italaj ĵurnaloj la tria paĝo estas kutime dediĉita al kulturaj temoj.



saĝo de niaj kampuloj, tiel malemaj ekpreni plumon kaj eĉ pli malemaj subskribi. Kiam en la ĵurnalistaj medioj, kiujn vi frekventos diskrete, vi aŭdos: “Necesas diskonigi la subskribon”, ne aŭskultu la flaton. Memoru la antikvan moton, kiu validis je la tempo de faŝismo, sed plu validas nuntempe, ĉar faŝismo estas produktaĵo nia: “Kiu subskribas, pereas.”<sup>28</sup>

Kaj fakte, kiu estas la plej ofta akuzo kiun beletristoj direktas al la kolego apenaŭ iom pli fekunda ol ili? “Li verkas tro multe”, ili diras. “Li estas multverkisto”. Ŝajnas eble strange, sed en la beletra mondo la plej grava peko de verkisto konsistas el verkado. La Nia sin detenas de tio, kiom eble: artikolo kun ekzota koloro je dudek jaroj, singarda recenzo je dudek kvin, je tridek, jam sukcesa intelektulo, li “kuratoros” librojn, evitante ilin verki aŭ traduki. Du paĝetoj da antaŭparolo, ĝuste por sin antaŭdefendi, neniam tro laŭdaj, eĉ, male, limigaj (“ni prezentas ĉi tie kolektitaj iujn verketojn, minorajn sed signifoplenajn, kvankam en iliaj limoj, en la honesta traduko de Gerolamo Traslati...”). Se la libro havos sukceson, lia estos la merito. En la kontraŭa okazo, tute facile oni transŝovos la kulpon al tiu kiu laboris. Se malsanulo mortus, ĉu oni povus, konsciencie, doni la kulpon al la kuratoro-kuracinto?

---

<sup>28</sup> Vortludo: la faŝisma frazo estis “Kiu haltas, pereas”. En la itala “Kiu haltas “ estas “Chi si ferma”; ŝerce oni transmetis al “Chi si firma” (Kiu subskribas).